★

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Lingvoj kaj komunikado

**Prelegos:** Josef Vojáček

Homo diferenciĝas de bestoj i.a. per tio, ke li uzas por interkomunikado artikulaciitan lingvon. Dum evoluo de la homaro ĝi iompostiome evoluiĝis kaj dank´ al areo de nia planedo unuopaj homaj komunumoj kreis siajn proprajn lingvojn, kiujn nuntempe estas pli ol 7000. Vi aŭdos ion pri ĉi tiu evoluo, problemoj de interkomunikado kaj eblecoj se ilia solvo. Unue mi diros ion ĝenerale pri lingvoj, poste pri naturaj lingvoj, kiuj servis kiel internaciaj kaj en la lasta parto pri artefaritaj lingvoj - planlingvoj - pri ilia ekesto kaj evoluo.

Ĉeesta programo, ne estos elsendata rete. Ĝi estas registrota.
**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 12-an de aprilo 2023 je la 18-a h. (La klubejo estos malfermita ekde 17.45)

**Kie:** Občanský klub, **Hybešova 65a**, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybeŝova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la mapon. La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

★

## Ni rekomendas

- la 13an de majo 2023 Lanĉo de libroj Sadako musí žít! (tradukis) a Mia vivo kun Esperanto (verkis Petr Chrdle), Olomouc
- (eble) la 20an de majo 2023 **Esperantista renkontiĝo en Šumperk**
- 29 de julio — 5 de aŭgusto 2023 **Universala kongreso**, Torino, Italio
- 5 – 12 aŭgusto 2023 **Kongreso KELI**, Bjalistoko, Pollando
- **Instruista trejnado, Poznano**. Pli de informojn vi povas legi en artikolo verkita de Ilona Koutny kaj Katalin Kováts ĉe http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/instruista-trejnado.html.
- Dujara ĉeesta magistra studado **Linguistics and Information Management** en Universitato de Adam Mickiewitz en Poznano. Pli da informoj vi trovos ĉe https://kml.amu.edu.pl/en/interlinguistics/.
- Nova libro Tetjana Lohvinovska: **Pensoj pri la Esenco**. 80 paĝoj, tradukis Oldřich Arnošt Fischer. Aĉetebla ĉe butiko@esperantobrno.cz. Kosto 290 CZK (ĉirkaŭ 12 EUR), sendokostoj laŭ lando kaj pezo. Ni sendas nur en EU por eviti dogandeklaron.
- Montru, ke vi regas Esperanton, aliĝu al **KER-ekzameno**. Jam en kvar niveloj: B1, B2, C1 kaj ekde pasinta jaro ankaŭ C2. Retaj ekzamenoj junie (krom C2), ĉeesta ekzameno en Torino la 4-an de aŭgusto. Reta kaj ĉeesta C2 la 4-and de aŭgusto. Pli da infromoj kaj aliĝilo ĉe https://edukado.net/ekzamenoj/ker.

★

## Cetera programo en aprilo

La 19-an **Kion ni legas** – diskuto pri esperantaj libroj, rete per Skajpo
La 26-an *Ankoraŭ ne agordita*, Občanský klub, Hybešova 65a

# Programo en majo

La 3-an **Pli kaj pli alte aŭ Kelkaj rimarkoj pri alta konstruado –** Ewa Caban, Komuna renkontiĝo kun klubo en Glivice, rete per Zoom
La 10-an *Ankoraŭ ne agordita*, Občanský klub, Hybešova 65a
La 17-an *Ankoraŭ ne agordita*, rete per Skajpo
La 24-an *Ankoraŭ ne agordita*, Občanský klub, Hybešova 65a
La 31-an *Ankoraŭ ne agordita*, rete per Skajpo
Mi petas vin, ke vi jam primensu vian proponon por aprila kaj maja programoj. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos.

★

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo),
- na naší stránce na Facebooku (https://www.facebook.com/esperantobrno/)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem kanálu na Youtube (https://www.youtube.com/@esperantobrno).

Milan Kolka
prezidanto